

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE *HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ*

<http://www.gazetofeko.com/kajeroj/k63.htm>



Kajeroj



el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Juan Antonio Cabezas Martínez**,
c/ Jabonerías, 6-3ºD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Vicprezidanto: **Pedro Ruiz García**,
c/ Almenara, 17-2º B,
ES30 004 Murcia (Hispanio)

Sekretario: **José Pina Tuells**,
Av. Murcia, 7-3º A
30110 Cabezo de Torres (Murcia)

Kasisto: **Carmen Hernández Valdés**,
Avdº Marín Esparta, 15-3ª
30008 Murcia.

Redaktoro: **Jesuo de las Heras**,
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

ISSN 1697-6460

Pretigas la Kajeron:

Provkorekto: **José Pina Tuells**,

Redakto: **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al nova konto
nº 2043-0138-14-090002040-3 Sen aldona
kosto. La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni
ricevos.*

Kajeroj el la Sudo regule interŝanĝas kun:

- 1 **Esperanto**, redaktata de Stano Marček,
- 2 **Boletín**, de Miguel Gutiérrez Adúriz,
- 3 **Monato**, de Stefan Maul,
- 4 **Juna Amiko**, de Geza Kuruez,
- 5 **Sennaciulo**, de Krešimir Barkovič,
- 6 **SAT-Amikaro**, de Jean Selle,
- 7 **Internaciisto**, de Luis Serrano.
- 8 **La Kancerkliniko**, de Ĵak le Puil,
- 9 **Litova Stelo**, de Petras Čielauskas,
- 10 **Laŭte!**, de C. Baudé,
- 11 **La Migranto**, de Antje Noordewier,
- 12 **Juna Penso**, de Vinko Markov,
- 13 **SLEA-Infornilo**, de P. Persson,
- 14 **Naturista vivo**, de Ervin Fenyvesi, kaj
- 15 **La verda proleto**, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



Kovrilo: SAT, Kien vi iras?

Enhavo

Redaktore	3
Informoj de la prezidanto	4
La problemoj pri SAT	5
Omaĝo al José María Bernabéu Franco	15
Pri la graveco esti <i>Letizia</i>	17
BET40	18
Malbrok kaj Hispanio	20
La Faraono	21

Ne subskribitajn
artikolojn verkis
la redaktoro.

Oni povas reprodukti
artikolojn, kondiĉe ke
oni citu la originon.

*Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi
ĉiun artikolon kies enhavo estas inte-
resa kaj ne mistraktas iun ajn per-
sonon.*

*Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas
la aŭtoroj mem, ne la
redakcio.*

Redaktore

Kajeroj el la Sudo venas denove antaŭ vi post nur kelkaj tagoj, por regajni la normalan paŝon de nia apero. La antaŭa numero aperis je la fino de la monatotrio



pro diversaj kialoj, sed ni ĝis nun venis ĉe vi ene de la monatotrio, kaj ni klopodos fari tion en la estonto, ankaŭ.

Sed aldone urĝas klarigi al anoj de HALE pri la grava problemo, kiun nia asocio trapasas nun, ĉar la malestimo kaj kalumnio al nia asocio fare de du eksamikoj de nia afero irigis la aferon ĝis neeltenebla punkto. Vi ĉiuj legis la artikolojn koncernajn, per kiuj Marteno Bustin' Benito kaj Jakvo Ŝram esprimis sian malkontenton kaj malkonsenton kun kelkaj artikoloj publikigitaj ĉi tie. Nenio kontestebla tie, sed se la kaŭzo de malfeliĉo estas la rajto publikigi, tio tuŝas esprimliberon, kaj tion limigi estas cenzuri, kaj pro tio, netolerebla.

Mi akceptas, ke homoj ne konsentu kun decidoj miaj aŭ de nia estraro, ĉar nek mi nek ni povas kredi, ke ni neniam eraras. Pro tio, mi alte valoras diskutadon kaj debaton. Sed mi tre malalte valoras ideologion —ĉian ajn— ĉar ili buŝbremsas liberpenson pro timo al herezo. Je nia *progresiga* etoso disvolviĝis kelkaj ideologioj, kiuj sanktiĝis pro tiom da senkritikokapablaj homoj, kiuj, aliflanke, estas ĉarmaj personoj. Ili nur estas tro pigraj pensi per si mem, kaj ili preferas akiri pensojn jam pretigitaj de aliaj. Tio estas ideologio: pensoĉeno kies eroj pli-malpli kongruas unu la alian, kaj gvidas siajn subtenantojn al pli-malpli difinita *kaŭzo*. Tiu

ideologio kutime estas religia aŭ politika. Ne estas strange, ke ĉiu ideologio parolas malestime pri ĉiu alia ideologio, ĉar ili ja estas konkurantoj unu la aliajn. Ni pensu pri la takso de katolikoj pri komunismo kaj inverse. Revelema anekdoto estas la fakto, ke en Pollando estas tiom multe da preĝejoj kun la nomo *Fátima*. «Kial estas tiom da ili en lando tiom malproksima la urbeton de Portugalio, Fátima?», mi demandis al pola amiko dum vizito al Zako Pane. «Ho! Tio ja estas pro tio, ke la Virgulino diris en Fátima al ŝafistetoj, ke Komunismo mortos antaŭ la fino de la 20-a jarcento!» Aliflanke, komunismo malpermesis religion en Sovetunio kaj en ĉiuj aliaj landoj, kie ĝi povis. Esti katolika en Pollando kaj aliaj *satelitlandoj* estis kontraŭi komunismon. En franka Hispanio la reĝimo ne havis veran ideologion, kaj eĉ promociis katolikismon. Pro tio, tiom da ni estis *unuhoraj katolikoj*, ĉar ni venis al meso unu horon semajne, kaj forgesis pri la mesaĝo de Kristo kaj aliaj eroj de katolikismo dum la tuta cetera semajno.

Kaj plej terure estas, ke sklavoj de ideologioj forgesas, ke pli grave ol ili estas la homoj, kiuj suferas ilin. Homo pli gravas ol ideologio. Kiam mi loĝis en Britio, mi memoras, ke oni demandis al bharatano, kiu vivis tie, ĉu li estas laborista, ĉu konservativa. «Mi amas ambaŭ ilin!», diris li. Jen leciono, kiun humanismaj homoj devas neniam forgesi. Pro tio, mi prezentas la tutan kazon, kiun ni suferis ĝis nun, fare de maltoleremo blinda, sekteca kaj dogmema de personoj, kiuj oficiale rifuzis dogmigon. Sed mi ne atakis kaj ne atakas la homojn, kiuj kaŭzis tion. Mi daŭre tenas mian malferman manon al ili.

Informoj de la prezidanto

Estimataj haleanoj: antaŭ du monatoj ni, HALE, ricevis mesaĝon de SAT, kiu diris “HALE ne apartenas al SAT”.

Surprizis min la novaĵo, ĉar mi demandis kiel povas ekzigi SAT HALEn? Kial estas la proceduro pri eksigo?



Mi sendis leteron al Prezidanto de la Plenumkomitato de SAT, ĉar mi diris ke la proceduro devas esti leĝa,

kio signifas, kun akto de akuzo, defendo de HALE kaj poste decido.

Sed la Prezidanto de SAT diris “tio estas leĝe, ĉar ni balotis kaj decidis”; sed ankaŭ en Sovetunio estis leĝe kiam pri esperantistoj la policistoj unue balotis kaj poste decidis pafadon.

Mi intencis, ke se SAT volas ke HALE ne apartenu plu al SAT, la proceduro devas esti leĝe, sed la Prezidanto de la Plenum’ Komitato de SAT rifuzis tion.

Ne estas kompreneble, ke la tuta estraro de HALE apartenu al SAT, kaj tamen SAT eksigas HALEn.

Kiel Prezidanto de HALE mi bedaŭras, ke SAT apliku faŝisman proceduron kontraŭ la unika asocio por liberpensoj, kiu kunlaboras kun SAT. Ĉar mi devas rememori, ke HALE estas progresema asocio, laŭ la decido de la lasta kongreso, kaj asocio kiu defendas la liberpensojn.

Se HALE estas progresema asocio kaj defendas la liberpensojn..., kion defendas SAT? En tiu ĉi momento mi ne scias, antaŭ

du aŭ tri monatojn, mi diris SAT defendas progresemajn ideojn, kaj al ĝi apartenas progresema persono, sed kiam la Prezidanto de SAT rifuzis mian peton, mi pensis, ke SAT estas penplena de faŝistoj kaj malprogresemaj personoj. Ĉu vi ne kredas tion? Mi diras al vi ekzemplon.

Kiam en la kongreso de Alikanto, kelkaj samideanoj SATanoj sed ne HALEanoj petis mian demision, **Kajeroj el la Sudo** publikigis en sia unua paĝo tiun peton. Per privata letero, mi ofertis HALEn al ili, se ili aliĝas la asocion, sed Tonjo del Barrio, respondeculo de la asocio, rifuzis mian oferton. Tuj mi skribis al **Sennaciulo** por publikigi la defendon de HALE kaj SAT kaj **Sennaciulo** rifuzis publikigi la artikolon de LEAo, amika kaj rilatanta al SAT.

Kaj mi demandas: ĉu ne estas progresismo publikigi je la unua paĝo tion, kion **Kajeroj el la Sudo** publikigis? Ĉu ne estas faŝismo malpermesi defendon de amika asocio?

Vere, mi akuzis kiel inkvizician proceduron, tiun uzatan de SAT kontraŭ HALE, kaj ni hispanoj nur tre bone konas procedurojn inkviziciajn, kaj mi plendas, ke SAT uzas tiajn procedurojn. Mi esperas, ke SAT ne ataku inkvizicion, ĉar ĝi estas la moderna inkvizicio.

*Johano Antonio Cabezas,
prezidanto.*

La Problemo pri SAT

La lastan numeron, ni informis al vi pri nia

eksigo de la sino de

SAT. Nu, multaj aferoj estas direndaj pri tio.

Sed, esence, la resumo estas, ke tio *ne okazis*.

Ni HALEanoj ne povas akcepti, ke oni perforte kaj kontraŭleĝe deklaru, ke HALE ne plu rilatas al SAT. Estas vere, ke de antaŭ kelkaj jaroj kelkaj anoj de SAT, elstarante Ĵakvo Ŝram kaj Marteno Bustin' Benito, ade kampanjis kaj mensogis kontraŭ ni en SATaj etosoĵ, pro tio, ke HALE ne estas sufiĉe *maldekstrisma*, laŭ ili. Sed estas tiuj du *birdoj*, kaj ne ni, kiuj estas eksigendaj de SAT, ĉar laŭ tio, kio aperas je la dua paragrafo de la unua punkto de la Statuto de SAT (publikigita de *Kajeroj el la Sudo* je nia numero 49-a), SAT, *ne estante partipolitika*, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, *celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj* rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj. (Kompreneble, la nigriĝoj estas miaj). La aferoj, kiuj ekŝutis la problemon de tiuj du homoj estis artikolo subskribita de falangiisto, Fernando Letamendia (*KeIS* n° 46-a), la akra reago de Snajpero ĉe la paĝoj de *Laŭte!* (n-ro 149-a) estis kontestata de mi per artikolo *Pri pasia reago al alies opinio* kaj *Limoj al esprimlibero*, de Jozefo Pina Tuells, kaj aldone, de la Prezidanto de HALE per siaj *Informoj* (ĉiuj tri lastaj je numero 48-a), kiuj siavice kaŭzis respondon de Marteno Bustin' je la sekvinta numero, per



siaj artikoloj *Kelkaj necesaj klarigoj* kaj *Kial mi eksigos de HALE*, kie li ankaŭ protestis pro la recenzo de la numero 47-a pri la libro *Tiuj niaj*, de Federico Jiménez Losantos. Mi invitas ĉiujn HALEanojn relegi tiujn artikolojn, kaj tiujn menciitajn de mi en tiu ĉi artikolo, por esti bone informita pri tiuj eventoj kaj sekvi mian penslinion, kiu pruvas, ke la eksigon de HALE estas kontraŭleĝa, maljusta, kaj tute nerimarkenda.

Ĵakvo Ŝram, tiam ne Prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT, siavice, protestis kontraŭ la dirajoj de la Prezidanto de HALE pri Snajpero¹ ĉe n° 48-a de *KeIS* per sia artikolo *Reago pri la Snajpera afero* (n-ro 49). Mi prikomentis la artikolojn de Marteno Bustin' per mia *Kelkaj rimarkoj pri la artikoloj de Marteno*, ĉe numero 50-a. Oni ankaŭ ne neglektu la unuan paragrafon de la artikolo de Antonjo Marko Botella, *La kaŭzo de malriĉuloj* ĉe numero 52-a, kie li ankaŭ flankiĝas kontraŭ sia iama magazino sen debate.

Sed tio, kio vekis la akran sintenon de Ĵakvo Ŝram estis, verŝajne, mia pritrakto de la Kongreso de SAT en Nagykanisza, ĉe numero 52-a. Ĉe numero 35-a ni legis lian *Akran reagon*, kiu estas plenplena da personaj akuzoj kaj antaŭjuĝoj. Mi provis raciigi liajn argumentojn per mia *Kio estas SAT?* ĉe la sama numero, sed tio ne efikis. Je la sekvinta numero, mi denove pritraktis postulon de Marteno, kial mi ne devas lasi mian postenon, per mia artikolo *Plendo*. Eble ne plaĉis al li mia konektigo pri Moe, Yasir kaj Ariel...

Kaj nun venas kurbopunkton en tiu ĉi disputo, ĉar ĝis tiam, ĉiuj havis voĉon, kaj ĉiuj povis diri sian kazon en *Kajeroj el la Sudo*. Sed venas la jaro 2003, kaj pri la Kongreso de SAT



Antonio Marco Botella

¹Bizara kaŝnomo de Nikolao Ŝil, kiu signifas *kaŝita mortopafisto*.

en Alikanto, SAT75, Ĵakvo verkas fantazieskan raporton, kiu fifamigas HALEn kaj aliajn esperantistojn hispanajn, kiuj *ne helpis Martenon pro malfaciloj en HALE!* Kompreneble, mi verkis kaj sendis reagon al **Sennaciulo**, sed ĝi ne aperigis ĝin, ĉar mi *ne estas ano de SAT* kaj verŝajne tie verkas nur SATanoj! Ankaŭ dum la Kongreso de Alikanto kreiĝas MSATeH, kun grava ombro en sia naskiĝo: mi estis petinta al ties inciantatoj, ke mi volas esti fondanta ano, sed ili ignoris tiun peton. Mi ne scias ankoraŭ pri kian kriterion ili uzis elekti fondantajn anojn, sed mi estis speciale apartigita de tiu kvalifiko, kaj fakte je la fondiĝo aperis postulo, ke nova ano devas esti subtenata de du anoj. Bonkora Dario Rodríguez López de Silva pretis apogi min, sed mankis alia samideano, do mi ne povis aliĝi la asocion.

Kaj venis la kongreso 76-a de SAT, en Ŝodefon' (Svisio), kies laborkunsidoj dediĉis multe da tempo kaj zorgo al HALE, laŭ la numero 1180-a de **Sennaciulo**. Ni supozu, ke la kompilintoj de ties longa artikolo, Graĵina Opulskiene kaj Kreŝimir' Barkoviĉ, ne mensogis je sia raporto pri ĝi. Povas ŝajni troiga vorto, *mensogi*, sed la graveco de la diraĵoj tie postulas,

ke ni estu zorgaj je nia analizo. Fakte, mi ne deziris kontraŭstari tiun artikolon, sed mi vidas, ke grava kaj maljusta decido sekvis tiun mispaŝon, kaj pro tio mi nun devas reagi. Do, se tio, kion ili diras tie, estas vera, mi devas elstariĝi, ke **Kani** mensogis, kiam li asertis, ke HALE ne kunlaboris en la pretigo de la Kongreso de Alikanto aŭ ne ĉeestis oficiale ĝin. Fakte, HALE estis blokita de Marteno Bustin', kiu konstatis, ke li ne deziris helpo de la estraro aŭ aliaj anoj de HALE, kiam li asertis, ke HALE ne funkciadis dum la lastaj jaroj —fakte Marteno mem havus respondeco pri tio, ĉu ne?, ĉar li estis Prezidanto de HALE ĝis kiam li malkuraĝe forlasis la postenon, sen havi anstataŭanton—. Ankaŭ li duonmen-

sogis, kiam li ne diris, ke kunlaboro kun HALE ne eblas, ĉar ili, la estontaj MSATeHanoj **ne volas**. R. Lynn diras, ke li petos raporton pri la situacio en Hispanio, sed fakte li nur sendas unu retmesaĝon demandante ĉu HALE voĉdonas por eksigi sin de SAT, kaj duan mesaĝon, komunikante, ke ni ne plu estas en SAT, kiun ni publikigis je la dorso de nia lasta numero. **M. Duc Doninaz** certe mensogas, kiam li asertas, ke en **Kajeroj el la Sudo** aperis artikoloj kontraŭ SAT. Mi oficiale defias lin trovi eĉ unu artikolon tian, kaj postulas, ke se li ne trovas ĝin, li publike pardonpetu al HALE je la venonta kongreso de SAT. Neniam ni *donis voĉon* al faŝisto, sed nur tradukis kaj publikigis artikolon, kiu kongruis kun la ideologio de SAT, eĉ se ĝin verkis ano de partio Falango, kiu estas la teruro de Marteno Bustin' kaj aliaj memdiritaj *demokrattoj*, kiuj sufokas liberpenson. Mi **pravigas nenion pro demokrateco ktp**, kiel li diras, sed nur defendas la rajton de ĉiu homo esprimi sian penson libere. Se tio estas kontraŭ la *SATmaniero*, kaj preter la tolerlimo de SAT, mi ankoraŭ ne diris tion. Duc Doninaz diris. **Kreŝimir' Barkoviĉ'** evidente ŝercas, kiam li diras, ke mi estas *la kialo de*



Dirinto
Marteno
Bustin'

ĉio, kaj kiam li asertas, ke mia aliĝpeto al MSATeH *estas pruvo*, ke en HALE *nenio okazas*. Bedaŭrinde, li ne komprenas, ke oni deziru kunlabori en diversaj esperantaj asocioj. Laŭ liaj vortoj, se li aliĝas UEAn, tio certe *signifas*, ke en SAT *nenio okazas*... Sed li, kaj **Kani**, kaj **Lutermano**, kaj multaj aliaj, mensogas evidente, kiam ili diras, ke la akcepto de MSATeH en SATn estas laŭregula: ĉiuj LEAoj devis esti demanditaj antaŭ fari decido, sed HALE ne estis konsultita. Kaj HALE dirintus, ke la akcepto ne estas senpaga: MSATeH devus garantii kunlaboradon, kiun ĝi ĉiam rifuzis, kaj sekve ĝi maltaŭgas kiel LEAo. Apartan komenton meritas la diraĵoj de **Barkoviĉ**,

ke se mi agas en SATeH *sammaniere kiel en HALE, tio estus bedaŭrinda*. Unue, la bulteno de MSATeH estas lumjaroj malantaŭ **Kajeroj el la Sudo** kaj teknike kaj kulture kaj pensriĉe, kaj mi pretigas ĝin de antaŭ sep jaroj. Fakte, li ne devas pensi, ke mi faras ĝin tiom malbone, ĉar li iam proponis al mi, ke mi zorgu pri **Sennaciulo**. Due, mi ne intencis eniri la estraron de MSATeH, sed nur apogi ĝin kiel baza asociano. Sed kiam estas malbonvolo, oni ne kapablas kompreni tiujn aferojn. Oni kontentiĝas nur je malbonvoleskaj celoj.

Marteno Bustin' Benito diris gravajn juĝojn en la Asembleo de SAT, kiujn li ne pruvis, kaj kiujn, bedaŭrinde, neniu postulis, ke li pruvu. Li asertis, ke *oni ankaŭ konsideru la realon*, kaj ke HALE *ne havas SATecan emon kaj kritikis la agadon de SAT kaj tiuj, kiuj ĉeestis kongreson en Nagykanisza bone scias kiamaniere Jesuo de las Heras forlasis SAT, ke li dufoje estis membro de SAT kaj dufoje foriris. Do nun estas nova LEA en kiu estas homoj, plejparte junaj, kiuj vere agadas por disvastigi la SAT idealojn en Hispanio*. Bedaŭrinde, nek Marteno, nek Ĵakvo, nek iu ajn parolantoj en tiu kongreso, aŭ en iu ajn alia kongreso de SAT, kiun mi partoprenis, difinis tiujn idealojn. En Nagikaniŝa mi forlasis SATn ĉar mi subite konstatis, ke ne estas sufiĉe da libereco en asocio, kiel mi kredis ĝis tiam. Sed tio estas persona opcio, kaj ne estas legitime, ke oni uzu tion kontraŭ tuta asocio. Resume, **Marteno** pruvis nenion, sed manipulasi multo, kaj tiuj, kiuj ankoraŭ kredas, ke li havas bonvolon, estis trompitaj de li kontraŭ asocio, kiu ĉiam agis laŭ la Statuto de SAT kaj tiu de si mem.

Ĵakvo Ŝram estas kutime amika homo, bonvola, sed li ne pardonas la grandegan pekon, ke oni kritiku SATn. Li estas tiom identiĝita kun SAT, ke li komprenas, ke kritikoj al Ĵakvo estas kritiko al SAT. De tiu mensa fuŝkontakto venas, ke li troige diras, ke mi agas

kontraŭ SAT. Fakte, mi ja multe skribis kontraŭ la mensogoj de Marteno kaj de Ĵakvo, sed neniam kritikis mi, ĝis nun, SATn mem. Fakte, dum ke ili mensogas kaj agas kontraŭ la spirito de SAT, kiu estas frateca kaj tolerema, mi fondas kaj pligrandigas gazetotekon, kiun mi nomumis laŭ Lanti, fondinto de SAT. Kaj tion farante mi havas helpon de bonaj esperantistoj, sed nenian de Ĵakvo, aŭ de Marteno, aŭ de SAT, institucie. Mi memorigas la leganton, ke mi proponis al SAT, ke mi aldonu **Sennaciulon** al la **Gazetoteko Lanti**, sed ĝis



Ĵakvo Ŝram

nun mi havas eĉ ne unu vorton pri tiu temo, kiun mi taksas grava en la historio de SAT. Tiuj du homoj, Ĵakvo Ŝram kaj Marteno Bustin' Benito jam kaŭzis tiom grandajn vundojn al la spirito de SAT —kaj sekve al SAT mem—, ke eble ĝi neniam resaniĝos. La afero ne plu estas HALE, sed SAT mem. Okazas kongreso, kie oni pritraktas gravan temon, *ĉu LEAo estas SATeca, ĉu ne*, sed neniu opinias, ke la koncerna LEAo estu konsultata. Neniu prenas la rolon de *advokato de l' diablo*. Kelkaj asambleanoj demandas pli da informo, sed neniu konsideras, ke la LEAanoj koncernaj povas esti senkulpaĵ. Ŝajnas, ke temas, denove, pri *hispana taŭroludo*. **Ĵakvo** diras malestimajn vortojn, kaj denove mensogas, kiam li diras, ke mi estas kontraŭpropagandanto de SAT. Mi defias, ankaŭ lin, ke li trovu eĉ unu vorton mian kontraŭ SAT, ĉar ankaŭ li devas kompreni, ke li ne estas SAT. Kelkaj asambleanoj, kiel **Gari Mickel** kaj **Vilhelmo Lutermano** ne komprenis, ke oni ne akceptis min kiel reprezentanton de HALE ĉe la Ĝenerala Konsilantaro, kaj mi miras, ke oni akceptis la ĵakvan eksplikon, ke kvankam li *laŭstatute volis aligi lin, lia koro*

rifuzis tion fari. Mi ne komprenas, ke se la koro kaj la devo de tiu estrarano divorcas, li ankoraŭ ne demisiis, aŭ oni ne devigis lin fari tion. *Lex dura lex,* leĝo estas dura, sed oni devas plenumi ĝin, diris saĝa romianoj. Ĉar kiam ĉio malsukcesas, nur leĝo defendas bazajn rajtojn de asocioj. Tiu turpa ago de Ĵakvo, kaj absurda akcepto de la cetero de SAT, vundis la asocion pli profunde ol oni konscias nun. Ĝi pruvas, ke la opinio de individuo estas preter la Statuto de SAT, akceptita de kelkaj generacioj de bonaj SATanoj. Fifamigo, skandaligo, gravas pli ol demokrata tradicio, kaj neniu staras defendi rajton. Ŝajnas ke finfine malvenkis Lanti, kaj venkis Drezen, la ĉampiono de maldekstro en asocio neparitopolitika, ne dogmiga.

Se oni detale legas tiun raporton pri la kongreso de Svisio, oni emas pensi, ke tiuj homoj, **Marteno kaj Ĵakvo**, certe timas simplan debaton kun mi. Ili ne povas permesi, ke ni konfrontu en altranga korpo, kie ni povos paroli libere, kaj mi pruvu, ke lia malamo al mi perversigas la aferon de SAT. Sed tio ne gravas. Mi nur kompatas SATn nunan, ĉar dum ĝi ne liberiĝu de gvidantoj tiaj, kia Ĵakvo estas, ĝi sukcesos pri nenio, ĉar ĝi estos kiel blankigita tomo, bona nur por morto.

Sed por ke la legantoj povu juĝi rekte pri la trajtaro de la nuna Prezidanto de la Plenum' Komitato de SAT, mi transkribos la mesaĝojn, kiuj laste aperis inter HALE kaj SAT. Unue ni legu la respondon de la Prezidanto de HALE al la Sekretario de la LEAO Komitato:

De: samideano2003@yahoo.es

Al: Roj Lynn

Dato: 20 aprilo 2004 12:38:50 GMT+02:00

Pri: HALE

Estimata Ronaldo:

Mi estas la Prezidanto de HALE kaj mi respondas la afablan leteron kiun vi sendis al la samideano Jesuo kaj li trandonis ĝin al mi.

1°.- *HALE ne ekzigas de SAT.*

2°.- *Se SAT ne volas, ke HALE plu estu LEAO de SAT ĝi mem devas ekzigi HALEn, sed, por tio ĝi devas sangi la Statuton, ĉar ne ekzistas proceduro por la forĵeto.*

3°.- *Se SAT farus tion, SAT fariĝus inkvizicio, car gi forjeta la voĉon de la kritikuloj, la voĉon de la herezuloj. Tio povus esti kiel la disputo inter Lanti kaj Drezen. La spirito de SAT estas de libereco, ĉar ĉiuj tendencoj de la laboristoj povas kunvivi en ĝi, kun disputoj, sed ne kun inkvizicio.*

4°.- *Ekzistas alia asocio de laboristoj en Hispanio, SATeH, kiu ne povas havi reprezentanton en la Ĝenerala Konsilantaro ĉar HALE diras ne kaj pro tio ne estas unuanimeco.*

5°.- *Ĝis nun mia laboro estas moderacii la radikalismojn HALEanojn, pro tio mi ne parolis en **Kajeroj el la Sudo** pri la disputo inter Ĵakvo kaj Jesuo, aŭ pri la mensogo de Marteno en la kongreso de Alikanto, aŭ la malpermeso de mia artikolo, defende de HALE, en **Sennaciulo**, aŭ la kontraŭstatuta malpermeso al Jesuo esti konsilantara reprezentanto de HALE. Mi ne parolis ĉar la laboro de la Prezidanto estas serĉi pacon, ne milito.*

La forĵeto de HALE el SAT implicas deklaración de milito de SAT kontraŭ HALE, kaj mi pensas ke ne estas bona milito inter ambaŭ asocioj.

6°.- *Mi pensas, ke la disputo inter Ĵakvo kaj Jesuo estas bona por plibonigi la demokration en SAT kaj HALE, kaj la disputo estas nur disputo; sendube Ĵakvo estas kuraĝa viro ĉar li akceptis esti Prezidanto de SAT kaj malmulte da viroj akceptas tiun respondecon.*

7°.- *Se SAT volas solvi tiun aferon la Prezidanto de SAT devas sendi pozitivan solvon a la Prezidanto de HALE.*

8°.- *Mi atendas vian respondon*

Juan Antonio Cabezas Martínez

Prezidanto de HALE

Tamen, ne reagis Roy Lynn, sed la Moŝta Prezidanto de SAT mem (la **nigrigoj** estas evidentaj mensogoj):

De: «Jakvo» <Jakvo@mac.com>
Pri: Re: hale
Dato: Wed, 28 Apr 2004 12:04:33 +0200
Por: <samideano2003@yahoo.es>

Estimata Prezidanto,

La membroj de SAT el la hispana lingva regiono decidis ke ene de HALE ili ne plu povas trovi la bezonatan liberecon kaj la maldekstran idearon por kiu ili volas batali. Ne plu havas sencon argumenti, ĉar estas la demokratio kiu decidis ke SAT-anoj el Hispanio preferas pli la maldekstran SATEH (substreku pli) ol la defendantan asocion de la **ekstremdekstra idearo de generalo Franko kaj la falangista subtenantoj**. Ne havas sencon kompari «Kajeroj el la Sudo» kun gazetaro de Hispanio, krome se vi tamen volas fari, rimarku ke **vi perdis vian legantaron pro malbona laboro de la redaktanto kiu ne respektas la ĝeneralan tendencan kaj idearon de la revuo**. Rilate via ligo al SAT, mi povas nur diri ke la plejmulto de la LEA-Komititatoj decidis ke HALE prefere ne plu apartenas al LEA-o. Tial la komitato rompita la «Gotenburgan interkonsenton» kun HALE (**perfekte eblas de ambaŭ flankoj**).

Mi ne dubas ke ankaŭ la Plenum-komitato de SAT aprobas la decidon (denove **faritan demokrate**) de la LEA-komitato kaj pro tio ne plu konsideras HALEn parto de SAT aŭ la LEA-o de SAT.

Rilate cenzuron, **SAT cenzuras neniam, sed povas okazi ke certaj tekstoj ne aperas**. Ĉi tiu estas decido de ne nur la redakta-komitato sed ankaŭ de la P.K. de SAT.

La lastan fojon ke reprezentanto de HALE partoprenis al LEA-Komitata kunsido datiĝas de la SAT-Kongreso en Nagykanizsa. Ĉiu bone memoras ke tiam la reprezentanto de HALE kreis gravan malebligon kunsidi dece kaj kamarade. Li ne partoprenis la kunsidon kiel estas la kutimo, ne atendis la parolordon, **fifamigis la prezidanton de la kunsido kaj plurajn SAT-membrojn**. Mi persone pensas ke HALE tro ofte elektas malĝustan

personon por reprezenti sin. Eble la afero ne turnintus kiel nun okazis se HALE sendintus personon kiu havas respekton por aliaj homoj, persono kiu kapablas diskuti **sen laŭte krii kaj sen interrompi la prezidanton de la kunsido kaj la parolanton kiu havas la parolovicon**.

Ne pensu ke iu en SAT aplaŭdis pro la decido kiu devas esti farita, sed jen la rezulto de dum jara **neglekto de amikaj vortoj kaj konsiloj**. La homoj, SAT-membroj el Hispanio ne bezonas **ekstremdekstran propagandon** en la revuo de sia asocio. Vi, kiel prezidanto de HALE plene neglektis tion vi subtenis la malĝustan personon por vivteni HALEn kiel LEA-on. Fakte vi ne nur subtenis malĝustan personon, vi, kaj la dioj diru kial, plene **neglektis la kritikojn de la plejmulto de la membroj de HALE**. Vi eĉ restis obstine je via vidpunkto **kiam iom post iom la membroj de HALE forlasis la asocion**.

Mi denove diras mi vere bedaŭras ke okazis kio devis okazi. Mi ĵuras al vi ke, se morgaŭ mi havas ideon aŭ subtenas homon kun eraran ideon en SAT kaj mi vidas ke la plejmulto el la membroj malakceptas mian ideon, mi povas fari du aferojn: Aŭ mi povas repensi miajn ideojn, aŭ mi prenas la plej saĝan decidon kaj mem forirus el la asocio se mi vere pensus ke mi kaj ne la plejmulto pravus. (kiu evidente ĉiam eblas ĉu ne?)

SAT nun havas alian kompanon en la batalo kontraŭ ekstrema-dekstra idearo, kontraŭ faŝismo, **kontraŭ maltoleremo**, kontraŭ murdistoj de la laborista klaso. Vi faris vian elekton, SAT faris sian elekton. La plejmulto de la membroj de SAT ne akceptas ke amika asocio aŭ asocio ligita al SAT **donas liberan forumon al faŝismema grupo**, al grupo kiu helpis la plej grandan despoton el Hispanio, Generalon Frankon. Persono kiu kulpas pri la morto de miloj da hispanaj gekamaradoj, persono kiu rompita la demokration en Hispanio.

Parto, grava parto de la batalo de la progresema maldekstra mondo estas kontraŭbatali la faŝistojn, la ekstremdestrulojn, la defendantojn de la ideoj de Hitler, Musolini, Ŝtalin, kaj via generalo Franko. **HALE donis al ĉi tiuj uloj liberan forumon**, jen la grava eraro de HALE doni liberan forumon ne estas kontraŭbatali. Denove vi faris vian elekton, kaj vi estas libera fari tion, SAT faris sian elekton, same libere.

Konsequenco estas ke kunlaboro inter niaj asocioj ne plu eblas. Jen la decido de la membroj de LEA-komitato. Mi esperas ke vi almenaŭ povas respekti la decidon de homoj kiuj volas daŭrigi la batalon.

*Jakvo Schram
Prezidanto P.K. de SAT*

Ni, fine, legu la respondon de nia Prezidanto:

Dato: Wed, 28 Apr 2004 11:16:31 +0200
De: samideano2003@yahoo.es
Pri: hale
Por: jakvo@mac.com

Estimata samideano!

Mi ricevis vian leteron kaj jen mia respondo:

1.- Temo falangista.

Vi eraras.

En Hispanio la ĵurnalo ABC estas konservativa, sed foj-foje aperigas ĝi artikolojn subskribitajn de socialistoj. Ĉu tio signifas ke ABC estas maldestra ĵurnalo? Ne, ĉar la estraro de ABC estas tre konservativa.

En Hispanio la ĵurnalo EL PAÍS estas socialista ĵurnalo, sed foj-foje ĝi aperas artikolon subskribitajn de konservativa homo. Ĉu tio signifas ke EL PAÍS estas dekstra ĵurnalo? Ne ĉar la estraro de EL PAÍS estas favore al Socialista Partio.

Okazas same en Kajeroj el la Sudo bulteno de la progresema HALE ke aperas unu artikolo subskribita per falangisto (en el Pais aperas almenaŭ du aŭ tri artikoloj po monato subskribitaj per konservativaj homoj) kaj preskaŭ ĉiuj diras ke Kajeroj el la Sudo estas preskaŭ organo de falangismo! Ne Kajeroj el la Sudo estas progresema bulteno.

Dum milito de Usono kontraŭ Serbio, nur Kajero el la Sudo rifuzis tiun ĉi militon sed Sennaciulo ne rifuzis ĝin. Ĉu tio signifas ke Sennaciulo estas favora al kapitalismo de Usono?

Se mi pensus same kiel vi kaj aliaj samideanoj mi povus pensi ke SAT kaj Sennaciulo apogas la kapitalismon de Usono.

La politiko de Kajeroj el la Sudo estas malfermi la paĝojn al ĉiu tendenco, kaj pro tio aperigas artikolon de tre ekmaldekstraj ideoj, aŭ progresemaj ideojn, kaj de tempo al tempo dekstra ideo por favori la debaton.

Se SAT kaj la SATanoj ne komprenas tion SAT kaj SATanoj havas grandan problemon: ne havi sufiĉe riĉan intelekton por kompreni la mondon kaj transformi ĝin.

2.- Kiel Prezidanto mi devas serĉi pacon...

En via letero mi rifuzas vian frazon kiam vi neniam intervenis kiam Jesuo kreis militon kun la plajperto de la HALEanoj...

2.1. Antaŭe, almenaŭ antaŭ unu jaro, mi sendis per interreto leteron al Antonio del Barrio ofertante lin la Asocion HALE. Mi nur petis de li kaj liaj amikoj ke ili aliĝu al HAIE, kaj post unu jaro tiel kiel la Statuto de HALE postulas, ili taŭgus esti estraro do mi alvokos balotadon en HALE, kaj mi persone petus la voĉdonon por li kaj lia teamo, kaj eĉ mi men voĉdonos por li. Li rifuzis.

2.2. Okazas ke en HALE multaj samideanoj ne estas anoj de SAT. Mia laboro estis ke HALEanoj iĝu anoj al SAT. Nun ĉiu ano de la estraro de HALE, inkluzivante Jesuon, jam aliĝis al SAT. Male al MSATeH, tiu dorlatata filino de SAT, kies Prezidanto konfesis publike, ke li nek estas nek estos ano de SAT.

2.3. Ĉar politika korekto estis favore al MSATeH, kiam mi faris oferton al

MSATeHuloj, kaj ankaŭ celante altiri SATanojn al HALE, mi sendis artikolon, unue privatan al vi, por ŝanĝigi vian opinion, kaj poste al **Sennaciulo** por publikigo. Sed ne aperis tiu artikolo, kiu defendas HALE, ĉar ĝi estis cenzurita de SAT.

En tiu momento la estraro de HALE opiniis, ke ni devas publikigi la artikolon en **Kajero el la Sudo** por pruvi la spiriton inkvizieskan de SAT. Mi rifuzis.

Oni legis en **Sennaciulo** erarojn gravajn pri la Kongreso de Alikanto kaj pri HALE kaj **Kajeroj el la Sudo**. En tiu ĉi revuo vi men publikigis artikolon, eĉ se ĝi estis malfavore al HALE kaj al **Kajeroj el la Sudo**. Tiu sinteno mankas en SAT.

Se ni cenzurintus vian artikolon, eble vi parolintus kontraŭ HALE kiel faŝista asocio per artikolo en **Sennaciulo**.

Sed ne aperis kritikado de SAT kiel faŝista asocio malgraŭ la cenzuro de la artikolo defendante la hispanan LEAo. Se aperas kritikado, ne mankas demokrati, kaj inverse. Se estas kritikado, eblas plibonigo de la asocio. Kaj inverse.

3.- Afero pri Jesuo kiel konsilanto.

3.1 Unue vi eraras pri la Ĝenerala Konsilantaro: ĝi ne estas gvidanta korpo de SAT, ĉar tiu, kiu gvidas ĝin, estas la Plenumkomitato, kies Prezidanto, mi opinias, vi estas. La Ĝenerala Konsilantaro nur konsilas, sed ĝi ne gvidas, laŭ la Statuto de SAT. Kaj estas rajto de la LEAo nomumi reprezentanton. Ne alia afero diras la Statuton, se oni ne laste sangis ĝin.

3.2. Evidente, kiam mi elektis Jesuon kiel reprezentanto de HALE li ne estis ano de SAT. Ni legis ties Statuton kaj ni konstatis ke ĉiu ano de HALE povas esti reprezentanto ĉe la Ĝenerala Konsilantaro de SAT. Vi men komprenis tiun

punkton kiam en la kongreso petis la opinion de la kamaradoj: «Ĉu samideano kiu ne estas ano de SAT povas gvidi SAT-n?» Sed la vera la demando estas «Ĉu samideano, kiu ne estas ano de SAT, povas diri al ni konsilojn?» Al la unua demando mi respondas «ne», sed al la dua demando mi respondas «jes». La kamaradoj respondis NE en la unua demando, kaj mi opinias ke la respondo estus malsama en la dua.

3.3. Mi ne komprenas tiun timon, kiu SAT havas pri Jesuo kiam vi diras «Jesuo de las Heras estas sufiĉe inteligenta (mi eĉ ne uzas la vorton ruza) por kontraŭargumenti kaj vere li povas doni racian eksplikon...» Bone, estas bone havi inteligentan viron, car ni povas kontraŭargumenti la argumentojn, kiujn Jesuo prezentu. Kiam Jesuo kaj la estraro rekontigas, ne estas malofte, ke oni venkas la argumentojn de Jesuo, kaj li akceptas la konkludon de pli bona argumento. Ĉu ne ekzistas inteligentajn homojn en SAT, kiuj eblas kontraŭargumenti Jesuon? Se kun Jesuo oni ne povas venki estante Jesuo progresema homo, kiel oni venkos faŝismon? Mi devas rememori ke la faŝismo kreskas en Eŭropo. Kiel SAT venkos faŝismon, se ĝi timas kontraŭarguemti personon progreseman Jesuon? SAT perdas bonan okazon trejniĝi per arumentoj ĉar Jesuo ĉiam donas argumentojn, ne malamon aŭ antaŭjuĝojn. Ne estas per malamo aŭ antaŭjuĝoj la maniero per kiu oni venkos la malamikojn de la laboristaro.

La homoj kiujn mi vere timas estas tiuj, kiuj metas bombojn en trajnoj, kinoteatroj aŭ vendejoj, sed ne tiaj homoj kiaj Jesuo estas.

4.- Proceduro de Forjeto.



Malgraŭ venomiga kampanjo kontraŭ HALE, ni estis en SAT75, kaj ni plenumis ĉiun rolon petita al ni de la Loka Komitato.



Aldone, oni vidu, ke nia rilato al SAT ĉiam estis, same kiel dum SAT75, amika kaj kunlabora.

venas de paĝo 11-a

La inkvizicia spirito de nuna SAT estas pruvita, kiam ĝi strebas al la eksigo de HALE sen protokolo pri la kulpigo aŭ de la personoj, kiuj subskribis tiun protokolon, kaj la identecon de la tribunalo. Ne sufiĉas ke la LEAoj komitato decidis la forĵeton sen proceduro. Ĝi povas decidi pri la politiko de la LEAoj, sed ne ties forĵeto sen proceduro kaj la ebleco por HALE sindefendi.

Kamarade via

Juan Antonio Cabezas Martinez


Prezidanto de HALE

Mi ne venos denove kontraŭ la mensogoj de malmemorula Ĵakvo, kiu konfuzas defendon de propraj ideoj kun insulto al aliaj homoj, interrompo kaj tiel plu. Mi nur substreku, ke estas terure, ke en memdirita progresema asocio, oni ŝafe kaj senkritike akceptu akuzojn, sen kontraŭstari ilin kun defendoj de la akuzato. Tio estas kafka, invizicia proceduro. Lenin' iam diris, ke *mensogo estas revolucia ilo*, kaj tiun ilon Ĵakvo --kaj Marteno-- ade uzis! Tamen, mi vidas nenie la revolucion, kiun Marteno kaj Ĵakvo intencas fari, krom fifamigi kaj kulpigi eksamikojn siajn.

Aliflanke, nenie en la Konvencio de Gotemburgo ekzistas proceduro apartigi LEAon, do tio, kion oni faris, estis demandi al responsuloj de la aliaj LEAoj, ĉu ili deziras, ke HALE daŭrige estu ligita al SAT, ĉu ne. Kaj, verŝajne, ĉiuj diris, ke *preferinde* ne. Sed okazas, ke neniu el tiuj LEAoj demandis ion ajn al HALE, neniu kontraŭstaris tion, kion oni diris kontraŭ ni. Do, ni havis nenian ŝancon esti senkulpigataj antaŭ *amikaj* aŭ *frataj* asocioj. Kaj, se oni juĝas el la ĵetata kontraŭ ni peko, *esti ne sufiĉe maldokstrisma*, oni tremu, ke nova purigado

ŝtalinisma denove venos kontraŭ alia LEAoj en la estonto. Oni ne pensu, ke dum frenezuloj regu SATn, iu ajn estos sekura el maljusteco. Mi invitas simpatiantojn de vero kaj libereco veni en HALEn, la progresema asocio kie oni ne trudas penson al siaj anoj, kie dogmigo ne estas, kaj toleremo kaj liberpenso estas alte valorataj. Nur per tiuj iloj eblas konstrui novan mondon.

Rilate al SAT, ni daŭre estas proksimaj, kaj ni ne agnoskas aŭtoritaton eksigi nin el la *sino de SAT*, eĉ se SAT mem jam forlasis tiun sinon. Ni konservu la atestilon por la homoj, kiuj morgaŭ renaskigos SATn.



Monumento al Libereco staras ĉe Centra Placo de Huhuj, Argentino, skulptita de Lola Mora.

OMAĜO al JOSÉ MARÍA BERNABÉU FRANCO

Karaj geamikoj:

La Esperanta Grupo “Ĉiam Esperanto” de Callosa de Segura kaj la Esperantaj Grupoj de Alakanto kaj Murcio, dankas tutkore al organizantoj de nia 15^a. Kongreso de Valencia-Federacio kaj Murcio, por omaĝi en la bela urbo Cheste, al nia karmemora José M^a Bernabeu Franco, elstara esperantisto; senlaca, sindonema kristano, ĉiam bona homo, afabla kaj korhumila.

Jen nomo kaj homo, kiun hodiaŭ ni omaĝas: José M^a, ĉefa motoro, fondinto, subteninto kaj inspirinto de nia konstanta laboro por Esperanto, naskita en Callosa de Segura (Alakanto) la 27-an de Aŭgusto 1920, kiam Esperanto ankoraŭ komencis adoltan aĝon, kaj transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta internacia kolektivo. Li studis en publika lernejo, kaj esperantistiĝis en la unuaj monatoj de 1936, kiam en la hispana esperanta movado, regis homoj amarkoraj pro la arbitraciaĵoj, kaj José M^a, pacema homo, kiu estis kaptita korplene de la brilanta heleco de nia “interna ideo”, devis sperti kiel baza soldato de la Hispana Respubliko en 1938, la ampleksan kaj doloran katastrofon de la unua frontvico en Teruel, kaj inter batalo kaj ripozo li propagandis nian internacian lingvon, kaj estis ofte kaj valoras trakti kiel kun iu vizaĝ-al-vizaĝe, mane la pafilon kaj esperantan

gramatikon, disvastigis nian idealismon; sed laŭ propa deklaro al mi, li neniam pafis rekte kontraŭ malamiko.

Li edziniĝis al Dolores Egea Estañ kaj ambaŭ starigis sian hejmon, kie naskiĝis kvin gefiloj, inter ili José Miguel, ŝatata samideano de ĉiuj ni.

Lia edzino lerta kaj sindonema al nia afero kiel la edzo, suferis la ebiecon de la esperantismo, kaj nia Hispana Esperanto



Federacio pro ŝiaj multaj meritoj, ŝin rekompencis per la jara premio *Klara Silbernik*, en la Kongreso de Murcio, destinata al edzino de esperantisto, kiu akiris gravajn meritojn en la laboro por Esperanto.

José M^a tuje kaj inde sekvis niajn idealojn kaj aktive partoprenis en nia Movado laŭ ĉiuj niveloj: Loka, nacia kaj eksterlanda. Fidele jam por ĉiam al nia afero, kaj ekprofiligiĝis lia fekunda agado por disvastigo de Esperanto kaj li estis unu el la esperantistoj, kiuj post la intercivitana milito multe strebis por restarigi la

Esperantan Grupon de Callosa de Segura. Peranto de SAT de 1963 ĝis 1969.

Gvidanto de kursoj, José M^a aktive partoprenis kiel instruisto de la Supera Kurso en la kampanjo de ILEI-Hispanio, por instruado de Esperanto al hispanaj docentoj. Li prezidis ĝis sia bedaŭrinda forpaso la Esperantistan Grupon de lia urbo. Estrarano en 1971 de la Organiza Kongresa Komitato de la 31^a Hispana Esperanto-Kongreso en Alakanto. Kurfondinto de HALE, kies unua prezidanto li estis, li organizis je 1992 la 3^{an} Kongreson de la Valencia-Murcia-Federacio, okazinta en Callosa de Segura. Okaze de tiu kongreso la urbestro de la menciita urbo eldonis libron en la hispana lingvo, “60 años de Esperanto en Callosa” (Sesdek jaroj de Esperanto en Kaljoso), verkita de nia kara samideano Antonio Marco Botella de kie mi ĉerpis la plej multon de tiuj ĉi vortoj. Iniciantinto kaj organizanto de antaŭ dudeko da jaroj, de la seninterrompaj Renkontiĝoj en la pinarbaro de la marbordo de Guardamar de l’ Segura dum la monato de Septembro. Kaj ankaŭ li estis Kasisto de Hispana Esperanto-Federacio.

José M^a baldaŭ rimarkis ke inter la naciaj kaj la Internacia lingvoj ekzistas nur unu gravega diferenco, nome diferenco de la **celo**. Dum la naciaj lingvoj havas la taskon kontentigi la bezonojn de komunikado kaj pensado en kadroj naciaj, la Internacia Lingvo liberigas la penson de la nacilingvaj ĉenoj kaj flugigas ĝin libere de lando al lando, de nacio al nacio tra la tuta mondo. Kiam amase oni eklernas la Internacian Lingvon en ĉiuj lernejoj de la mondo, dediĉante al ĝia studo nur kvaronon de la tempo, kiun oni dediĉas ne al lernado de kiu ajn fremda nacia lingvo, sed al lernado

de la propaj naciaj lingvoj, tiam la homaro ĝisvivos grandegan pozitivan spiritan revolucion, kaj tiam plene evidentiĝos la fruktodona kaj morala kaj intelekta efiko de la Internacia Lingvo.

Kaj por fini nian omaĝon, kaj por sekvi la spiriton de nia José M^a, ni devas sciigi al homoj ke Esperanto proponas komunikadon sen diskriminaciado. Sen ĝia utiligo la premo de la ekonomiaj fortoj neeviteble devigas la homojn, konscie aŭ nekonscie, disvastigi la lingvon de la ekonomie fortaj kun ĉiuj malavantaĝoj por tiuj, kiuj ne denaske parolas ĝin. La esenca problemo tamen estas konsciigi, ke almenaŭ parto de la solvo ekzistas kaj funkcias: ES-PERANTO.

Kaj nun permesu al mi legi poezion kiu nia Antonio Marco Botella, naskita en la sama urbo kaj amiko ekde la infaneco de José M^a, sendis al mi por ĉi tiu omaĝo:

Romanco al la memoro de José María Bernabéu

*Pli frat' ol amiko mia,
Ĝemas pro vi mia koro
Kiam estis mi sciinta
Ke forlasis vi ĉi mondon
Kie revis ni konsciaj
Pri homaro sen perforto
Kun parfum' el blankaj mirtoj
Pri justec' kaj am' simboloj
Kerno el l' esperantismo
Kiun amis ni kun fervoro...*

*Al mia memoro venas
Tiuj tre fascinoj tagoj
Kiam junaj ni, revemaj,
Ĉe la Gvardamar' strando
Parolis mi dum notk' serena
Pri virinoj kaj hunamoj,
Pri art' kaj allog' beletraĵoj,
Pri vivo kaj idealoj,
Dum palpebrumis la steloj
Kies nomoj mi parkeris
En la rava noktsilento,*

*Apenaŭ interrompita
De la marondar' rumoro...
Vere tiuj tagoj estis
La plej belaj el la vivo!*

*Sed ne revoj estis ĉio
Viglis vi en la movado
Ja vi estis garantiato
Pri honesteco kaj ordo:
Aktiva HEF-estrarano,
HALE-fondint', SAT-peranto
Tre senlaca laboristo
Kaj fervora batalanto...*

*En la vojaĝ' sen returno
En kiu vi nun vojaĝas
Mi esperas kun plezuro
Ke ĉe nia findestino
Mi denove renkontiĝos
En la brila kosm' senlima,
kaj denove ni babilos
pri amoj kaj poezio
ĉirkaŭataj de helsteloj
kvazaŭ ĉe revparadizo.*

Tiel okazos, José M^o!

Antonio Marco Botella

Al vi, amikoj-esperantistoj, kaj al vi, niaj estimataj gastoj, kiuj simpatias nian aferon, mi proponas, ke ni honoru la memoron de niaj multmeritaj forpasintaj samideanoj, Francisco Sánchez Antón kaj José Maria Bernabeu Franco, ambaŭ alakantanoj, per leviĝo de niaj seĝoj kaj adiaŭi lin kun la vortoj de nia plej elstara hispana esperantisto, Vicente Inglada Ors, al la memoro de eminenta esperantisto:

*Vi perdis la vivon, sed restis la koro
La hor' sin oferis kun fid' de kredanto,
Vi ĉion fordonis al ni kaj vi mortas
Vidonte triumfon de lingv' Esperanto!*

*En Alakanto 28an majo 2004
Rodolfo Canet Marin*

Pri la graveco esti Letizia¹

Dr. José L. Pérez Óvilo

Laŭdantoj, sen perdi minuton, promenis siajn plumojn kanti la virtojn kaj valorojn de la estonta Princino de Asturias, persono kiun hispanoj nur konis kiel parolantan buston je la “Novajoj”, kaj pri kiu oni nur povus diri, ke ŝi legis pli bone aŭ malbone la tekstojn, kiujn oni donis al ŝi. Sed ankaŭ ekzistis detalon tre revelema, kiun oni provis preterpasigi piedpinte, rilate al tiu emo tiom aktuala de hispanaj gepatroj nomumi siajn gefilojn strange al la hispana tradicio, per nomoj sen signifo en nia kulturo, aparte anglaj, karakterizigitaj ĉiuj ili per enhavo da duoblaj konsonantoj, intermetitaj hoj, kaj strangaj sonoj, kiujn eĉ la gepatroj ne povas prononci bone, kiuj anstataŭ doni al ili aĝiĝon kaj gravecon por supreniri ŝtupon en la socia skalo, kiel ili celas, nur atingas eivdentigi eĉ pli sian socian elvenon, kiun ili celas kaŝi per tio.

Kaj tiu estas la aspekto plej grava pri la manpeto de la Princo de Asturias, ĉar ne dubblas, ke la ŝanĝo a *Letizia* estas ago volonta de la koncerna persono, kaj tie ĉi jenas la esenco, ĉar la celo estas tiu de la sola ŝajniĝo, manifestante apartan trajton de personeco kies pretendo estas renonco al tio, kio oni estas, volante esti tio, kio oni ne estas, pro la opinio de aliaj.

Oni povas demandi al si kial ŝi ne enmetis hon post la t, atingante pli aristokratan *Lethizian*. Ne dubindas, ke manovroj tiaj taŭgas al Raphael, sed kion pensus ni hispanoj, se S-ino Letizia, de nun, imponus al Princo la nomon S-ro Philipo, celante pli grandan antikecon, stirpon kaj internaciigon de nia monarĥio. Ĉiel, ni deziru, ke en la estonto ni ne havos kiel reĝon iun Jonathan I-an de Hispanio.

Mursjo, la 11-an de decembro de 2003.

¹Artikolo malpermesita de la ĵurnalo “La verdad” de Murcia de la Grupo “Correo Vasco”.

La 40-aj jubileaj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-40)



La 40-aj jubileaj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-40) okazos la 10-18-an de Julio, 2004 en banurbeto BIRŠTONAS 40 kilometrojn suden for de KAŬNAS. La dua urbo de Litovio KAŬNAS situas je 100 kilometroj sudorienten de ĉefurbo VILNIUS.

Ĉi-jare BET estas dediĉata al eniro de Baltiaj landoj al Europa Unio kaj al venontjara jubileo la 90-a UK en VILNIUS.

Veno al la aranĝo la 9-an kaj la 10-an de Julio, forveturo - la 18-an de Julio.

Ĝis hodiaŭa tago al BET-40 aliĝis 150 personoj el 20 landoj. Aliĝoj ankoraŭ ĉiutage venas. Ni antaŭvidas ĉirkaŭ 300 partoprenantojn de BET-40.

Partoprenantoj de BET-40 loĝos en sanatorio «VERSME», en hotelo de katolika komunumo kaj en sportista komunloĝejo. Ĉiuj programeroj okazos en salono de urba kulturcentro, salonoj de urba municipo kaj en salonoj de sanatorio «VERSME». Konkrete solena inaŭguro, solena fermo, vesperaj kulturaj aranĝoj okazos en urba kulturcentro, seminario de Internacia Esperanto-Instituto kaj Balta Esperanto-Forumo okazos en du salonoj de urba municipo, ĉiuj aliaj programeroj okazos en salonoj de sanatorio «VERSME». En administra domo de sanatorio «VERSME» konstante funkcios Organiza komitato de BET-40 kaj riĉa libroservo.

Partoprenantoj de BET-40 manĝos en alia apuda domo de sanatorio «VERSME». La manĝado estos organizita kaj antaŭpagita. Menuo egala por ĉiuj. Eblos havi vegetaran manĝadon. Apude funkcias kafejo.

Hispane, saltamontes, montsalutulo.

Loĝlokoj, manĝejo, kunvenejoj estas proksime unu de alia kaj facile atingeblaj perpede.

Urbeto BIRŠTONAS estas atingebla buse, mikrobuso kaj aŭtomobile. La plej simple veturi al BIRŠTONAS el KAŬNAS, de kie veturas busoj al BIRŠTONAS ĉiuduonhore —ekde la 6-a horo matene ĝis la 21-a horo vespere. Prezo de busa bileto de KAŬNAS al BIRŠTONAS estas inter 5 kaj 5. 20 lidoj. Busoj de VILNIUS rekte al BIRŠTONAS veturas je 6. 50, 8. 30, 9. 30, 10. 55, 12. 30, 13. 30, 16. 00, 18. 10. Prezo de bileto estas inter 9. 10 kaj 12. 50 lidoj. De VILNIUS al KAŬNAS eblas trafi buse aŭ trajne, kiuj veturas pli-malpli ĉiŭore. Vojaĝo daŭras preskaŭ du horojn. Prezo de busa bileto inter VILNIUS kaj KAŬNAS estas 13 lidoj, prezo de trajna bileto inter VILNIUS kaj KAŬNAS estas 9,80 lidoj. En VILNIUS kaj en KAŬNAS busaj kaj fervojaj stacidomoj estas apude. KAŬNAS estas atingebla ankaŭ aviadile kaj ŝipe. Bonvolu ĉiuj atingu la lokon de BET-40 memstare. Ni ne havos eblecon renkonti vin en stacidomoj kaj flughavenoj de VILNIUS aŭ KAŬNAS.

Ekde la 7-a de Julio Organiza komitato de BET-40 funkcios jam en BIRŠTONAS. Tamen ĝis la 10-a de Julio oni deĵoros ankaŭ en oficejo de Litova Esperanto-Asocio, str. L. Zamenhofo 5, en malnova urboparto de KAŬNAS. Telefono en oficejo de LEA estas +370 37 208503, telefakso estas +370 37 228616. Telefono kaj telefakso de Organiza komitato en BIRŠTONAS estas +370 319 65670 kaj +370 319 65663. Portebla telefono de prezidanto de Organiza komitato Povilas JEGOROVAS estas +370 687 12219. Retadreso de Organiza komitato estas litova_ea@mail.lt Ĉambro de Organiza komitato en BIRŠTONAS estas sur la teretaĝo de administra domo de sanatorio «VERSME» (str. B. Sruogos 9). Ĉiujn informojn pri BET-40 ankaŭ eblas trovi en retejo de Litova Esperanto-Asocio www.esperanto.lt.

La 9-an de Julio (vendrede) kaj la 10-an de Julio (sabate) ekde la 8-a ĝis la 23-a horo en administra domo de sanatorio «VERSME» (str. B. Sruogos 9) okazos registrado de venantaj partoprenantoj de BET-40, loĝigo, eblos havi diversajn informojn. Dum registrado vi registros

vian alvenon, ricevos pakaĵon kun diversa materialo, programon de BET-40, karton kun notita via loĝdomo kaj ĉambro, loko de manĝado, kuponojn por manĝado k. s. Ĉiuj, kiuj ne pagis anticipu aliĝkotizon, loĝadon kaj manĝadon aŭ pagis neplene, dum registrado devos pagi ĉion konforme al kategorio. Novaj anticipu nealiĝintaj personoj plenigos aliĝilojn. Malfruigintoj povos registri partoprenon en BET-40 ankaŭ dum postaj tagoj. Registriĝo por la ekskursoj kaj pago okazos aparte dum la aranĝo.

GRAVE : Pro akiritaj subvencioj estas ebleco esence rabati kostojn de partopreno por la unuaj tri kategorioj de partoprenantoj (a, b kaj c). Por kategorio a kaj b (esperantistoj el Litovio, Latvio, Litovio, ekssovietiaj landoj) loĝado en sportista komunloĝejo kaj en dultitaj ĉambroj de sanatorio «VERSME» kostos duoble malpli, t. e. respektive 10 lidojn nokte kaj 20 lidojn nokte. Por partoprenantoj el orienteuropeaj eksksocialismaj landoj (kategorio c) la samo kostos 15 lidojn nokte kaj 30 lidojn nokte. Manĝado por la unuaj du kategorioj (a kaj b) tage kostos 10 lidojn, por kategorio c - 20 lidojn tage. Tiuj, kiuj ne aliĝis al BET-40 pro multekosteco, ankoraŭ povas tion fari nun. Ni akceptos ĉiujn dezirantojn.

La 10-an de Julio (sabate) vespere je la 19-a horo estas antaŭvidita komuna organiza kunveno de partoprenantoj. Dum tiu-ĉi kunveno vi ricevos necesajn praktikajn informojn. La saman tagon vespere okazos koncerto kaj libera interkona vespero sen fiksita programo.

La 11-an de Julio (dimanĉe) komenciĝos laboro de BET-40 kaj estas antaŭvidita organiza tempo por diversaj programeroj kaj por prepariĝo al solena inaŭguro de BET-40.

Dimanĉe (la 11-an de Julio) je la 17-a horo estas antaŭvidita katolika Diservo en Esperanto en loka preĝejo. Ĝin gvidos katolika pastro.

Solena inaŭguro de BET-40 okazos la 11-an de Julio (dimanĉe) je la 15-a horo en urba kulturcentro.

Solena fermo de BET-40 okazos la 17-an de Julio (sabate) je la 14. 30 en urba kulturcentro.

La unua pagita servo estas matenmanĝo la 10-an de Julio, la lasta pagita servo estas vespermanĝo la 18-an de Julio. Kiuj venos pli frue kaj/aŭ forveturos pli malfrue, devos pagi pro loĝado kaj manĝado aparte ĉiu persone.

Pri la ekskursoj. Merkrede, la 14-an de Julio, estas antaŭvidita tuttaga ŝipekskurso laŭ rivero NEMUNAS al subĉiela etnografia muzeo RUMSHISHKES. Tie okazos ankaŭ tagmanĝo kaj eventuale nacistila koncerto. Okazos ankaŭ aliaj surloka ekskursoj.

BIRŜTONAS estas bonega loko por simpla ripozo, promenoj k. s.

Bonvolu veturigu vendotaĵojn por libroservo, ekspoziciaĵojn, E-filmojn, lumbildojn.

La programo de la aranĝo estos riĉa kaj interesa. Laŭbezone eblos organizi apartan programon por gejunuloj kaj infanoj.

Ĉiutage aperos gazeto de BET-40. Ni antaŭvidas, ke la unua numero aperos jam la 9-an de Julio (vendrede). Tie vi trovos ĉiujn aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, prilumon de BET-40 k. s. Uzu la gazeton por diversaj anoncoj, proponoj, informu en ĝi pri la jam okazintaj programeroj k. s. Ĝi estas via gazeto, tial bonvolu anticipu prepariĝu kunlabori kun ĝi. Ni antaŭvidas, ke la gazeto estos 1-4 paĝa depende de via aktiveco, de la prezentita materialo por ĝi.

Laborlingvo de la aranĝo estas Esperanto.

Poŝta adreso de la aranĝo estas: BET-40, str. B. Sruogos 9, LT-4490 BIRŜTONAS, Litovio.

Dum BET-40 funkcios fotoservo, ekspozicietoj. Monon eblos ŝanĝi en urbaj bankoj.

Elektra tensio en Litovio ĝenerale estas 220-volta.

Nacia mono en Litovio estas lido kaj cendo. Unu lido egalas al 100 cendoj. Unu euro egalas al 3,45 lidoj, unu lido egalas al 0,29 euroj. La kurzo estas fiksita kaj ne ŝanĝiĝas.

Poŝtaj tarifoj en Litovio estas jenaj: simpla ĝis 20-grama letero enlanden kostas 1 lidon, eksterlanden 1,30 lidojn, aere - 1,70 lidojn. Oni devas plusi prezon de koverta.

Organiza komitato de BET-40 petas vin esti atentemaj, toleremaj, disciplinemaj, akurataj, ĝustatemaj.

Plena listo de partoprenantoj de BET-40 kun adreso eventuale aperos broŝure post la aranĝo, ĉiu ricevos ĝin poŝte.

Dum la aranĝo sekvu anoncojn sur la anonctabulo.

Prepariĝu aktive labori dum BET-40. Sukceso de la aranĝo dependas de ĉiuj partoprenantoj.

BONVENON AL BIRŜTONAS

Organiza komitato

(21. 06. 2004)

Malbrok kaj Hispanio

La 18an de julio oni starigos monumenton en la urbo Malbork (Pollando) dediĉita al Hispanio.

Kiel vi scias en tiu bela urbo, Mondheredaĵo de UNESCO, la lokaj esperantistoj, kun granda entuziasmo, komencis la konstruadon de la «PARKO DE LA MONDO». Tie, iom post iom, oni starigas ŝtonajn monumentojn ka arbojn dediĉitaj al diversaj landoj. Entute jam estas dudeko da landoj reprezentataj. Kaj Parko de la Mondo iom post iom kreskadas kaj disvastigas la nomon de Esperanto Internacie.

Lastaj monumentoj estis inaŭguritaj de Etsuo Miyosi (Japanio), Sean O'rian, prezidanto de Eŭropa Esperanto Unuiĝo (Irlando), Reinhard Selten, Nobelpremiito (Germanio).

Nun estas la vico de Hispanio. Oni starigos la momumenton dediĉita al Hispanio, kaj oni plantos arbon simbolan en nia lando.

Problemo estas ke ĉio kostos ĉirkaŭ 300 eŭrojn. Loka registaro ne havas tro da mono, kvankam entuziasme helpas la movadon (inter alie havigante al la lokaj esperantistojn belan sidejon ene de la urbodomo mem).

Ĉar mi sciis pri tio sufiĉe malfrue, kaj malmulte da tempo restas ĝis tiu ceremonio, mi petis mo-

non al HEF kaj al Fundacio Esperanto. Ankaŭ Valencia Esperanto-grupo iomete helpos. Sed eble tiuj helpoj ne venos ĝustatempe, kaj ne eblas atendi por diri al Malbork ke la skulptisto komencu ĉizi en la monumenton la vorton «HISPANIO». En Esperanto kaj en pola lingvoj, kaj la nomon de la arbo, ankaŭ dulingve, kiu simbolas nian landon.

Pro tio mi petas al ĉiuj bonkoraj esperantistoj financan helpon, grandajn aŭ malgrandajn donacoj, por ke tiu projekto estu realigebla. Se mono tross, kio probable ne okazos, restanta mono iros al la kaso de HEF por aliaj projektoj.

Do, mi fidas je la malavareco de niaj hispanaj (kaj eksterlandaj) samideanoj.

Mi ankaŭ petas al vi helpon por diskonigi ĉi tiun mesaĝon.

Mi ege malamas peti monon al la esperantistaro, sed en ĉi tiu momento ne eblas alimaniere.

Anticipe dankon, kaj elkorajn salutojn:

Augusto Casquero

**12-a Internacia Esperanto-Semajno
de la Kulturo kaj Turismo.**

2-9 de Oktobro 2004

SALOU (Tarragona) Hispanujo.

Pliajn informojn vi ricevos de Luis Serrano Pérez

Apartat 423. 08200-SABADELL . Hispanujo

Tel. (+34) 93 727 50 21

luis_serrano@mixmail.com

Faksilo: (+34) 937314111 (ne dum aŭgusto)

<http://www.terra.es/personal5/lherrano2003>

La Faraono

Ĉapitro 12-a

La plej grandan parton de la nokto Ramzes pasigis en febraj sonĝoj, Jen aperadis antaŭ li la fantomo de la ŝtato, kiel grandega labirinto kun potencaj muroj, ne laboreblaj. Jen li vidis la ombron de l' pastro, kies unu sola saĝa frazo montris al li la rimedon eliri el la labirinto. Kaj tute neatenditaj leviĝis antaŭ li du potencoj: la ŝtata racio, kiun li ne sentis ĝis nun, kvankam li estis kronprinco, kaj la pastraro, kiun li volis dispisti kaj fari ĝin sia servisto.

Malfacila estis la nokto. La kronprinco sin turnadis sur la lito kaj demandis sin mem: ĉu li ne estis blinda kaj unue hodiaŭ li reakiris la vidkapblon por konvinkiĝi pri sia senprudenteco kaj sia nuleco? Kiel aliaj ŝajnis al li nun la admonoj de la patrino, la modereco de la patro en la proklamado de lia plej alta volo, kaj eĉ la severaj agoj de Herhor?

—La ŝtato kaj la pastraro!—ripetis en duondormo la kronprinco, kovrita de malvarma ŝvito.

Sole la ĉielaj dioj scias, kio okazus, se sukcesus kreski kaj maturiĝi la pensoj, kiuj en ĉi tiu nokto ekplantiĝis en la animo de l' princo. Eble, fariĝinte faraono, li apartenus al la plej feliĉaj kaj plej longe regantaj monarĥoj? Eble lia nomo, gravurita en la subteraj kaj surteraj temploj transiris al la posteuloj, ĉirkaŭita de plej alta gloro? Eble li kaj lia dinastio ne perdis la tronon, kaj Egipto evitus grandan skuon en la plej malfacilaj tempoj.

Sed la lumo de l' tago dispelis la fantomojn, rondirantajn super la brulanta kapo de l' princo, kaj la sekvantaj tagoj tre ŝanĝis lian opinion pri la netuŝebleco de la ŝtata racio.

La vizito de la princo en la malliberejo ne restis sen rezultato por la kulpigitoj. La esplora juĝisto tuj prezentis raporton al la plej alta juĝisto, kiu revizis la aferon; li mem esploris kelke da kamparanoj kaj en la daŭro de kelke da tagoj liberigis plej grandan parton, kaj la ceterajn ordonis plej baldaŭ transmeti al la tribunalo.

Kiam en la nomo de la kronprinco, kies proprajon oni atakis, aperis neniu plendanto, malgraŭ alvokoj en la ĉambrego de la juĝejo kaj en la bazono, la afero estis nuligita kaj oni liberigis la reston de la kamparanoj.

Vere, unu juĝisto rimarkigis, ke laŭ la leĝo la intendanto de la princa bieno devus esti procesita pro malvera plendo kaj se oni pruvus lian kulpon, li devus ricevi la punon, kiu minacis la kamparanojn. Sed ĉiuj silente aŭskultis la demandon.

La intendanto sin kaŝis de la tribunalo,—li estis sendita antaŭe de la kronprinco en la nomoson Takens, kaj baldaŭ malaperis la tuta kresto kun la aktoj pri la atako.

Eksciinte pri tio, Ramzes iris al la granda skribisto kaj demandis kun rideto:

—Do, via ekscelenco, oni liberigis la senkulpajn, oni malpie detruis iliajn aktojn kaj, malgraŭ tio, la prestiĝo de la ŝtato perdis nenion?



—Mia princo—respondis la granda skribisto, same malvarme kiel ordinare—mi ne komprenis, ke per unu mano vi prezentas plendon kaj per la alia vi volas ĝin detruji. Via ekscelenco estis ofendita de la popolo, nia afero do estis puni ĝin. Sed se vi pardonis, la ŝtato ne oponos.

—La ŝtato!... La ŝtato!...—ripetis la princo.—Ni estas la ŝtato - aldonis li fermetante la okulojn.

—Jes, la ŝtato tio estas la faraono kaj... liaj plej fidelaj servistoj, - respondis la skribisto.

Ĉi tiu interparolado kun tia altrungulo sufiĉis por forigi el la animo de la kronprinco la vekiĝantan, potencon kvankam ankoraŭ neklaritan koncepton pri la signifo de la «ŝtato». Do la ŝtato ne estas eterna kaj netuŝebla konstruaĵo, al kiu la faraonoj devas aldoni po unu ŝtono de la gloro, sed pli ĝustadire amaso da sablo, kiun ĉiu regnestro aliŝutas laŭ sia plaĉo. En la ŝtato ne ekzistas tiuj malaltaj pordoj, nomataj leĝoj, kiujn trapasante ĉiu devas klini la kapon: la kamparano same kiel la kronprinco. En ĉi tiu konstruaĵo ekzistas diversaj eniroj kaj eliroj: mallarĝaj por la malgrandaj kaj malfortaj, tre larĝaj kaj eĉ komfortaj por la potenculoj.

—Se tiel estas—nova penso naskiĝis en la animo de l' princo—mi faros ordon, kia plaĉos al mi.

En la sama momento li rememoris du homojn: la liberigitan negron, kiu ne atendante ordonon estis preta doni sian vivon por la propraĵo de l' princo, kaj la nekonatan pastron.

—Se mi havus pli multe da tiaj homoj, mia volo valorus ion en Egipto kaj ekster Egipto—diris li al si mem kaj ekstentis nevenkeblan deziron trovi ĉi tiun pastron.

Tio estis sendube la sama homo, kiu detenis la popolamason de la atako kontraŭ la domo de l' kronprinco. De unu flanko li bonege konis la leĝojn, de la alia—sciis estri la amasojn!

—Netaksebla homo!... Mi devas lin havi...

—Najbara malpaco— diris al si mem la kronprinco.

De tiu tempo la princo en ŝipeto, kondukata de unu sola remisto, komencis viziti la domojn najbarajn de sia bieno. Vedita per tuniko kaj granda peruko, kun bastono en la mano, la princo havis aspekton de inĝeniero, kiu observas la levigon de Nilo.

La kamparanoj volonte donis al li ĉiujn klarigojn pri la ŝanĝoj en la formo de la teroj post la superakvo, kaj samtempe petis, ke la registaro elpensu pli facilajn rimedojn por la ĉerpado de l' akvo, ol la gruo kun la sitelo. Ili rakontis ankaŭ pri la atako kaj diris, ke ili ne konas la homojn, kiuj jetis la ŝtonojn. Fine ili bone rememoris la pastron, kiu tiel sukcese dispelis la amason, sed kiu li estis?— ili ne sciis.

—Estas ĉi tie— diris iu kamparano— en nia ĉirkaŭaĵo pastro, kiu kuracas la okulojn, estas alia, kiu resanigas la vundojn kaj kunmetas la rompitaĵn krurojn kaj brakojn. Estas kelke da pastroj, kiuj instruas skribi kaj legi; estas unu, kiu ludas duoblan fluton kaj eĉ tre bele ludas. Sed tiu, kiu aperis en la ĝardeno de la kronprinco, estas neniu el ili, kaj ili mem scias nenion pri li. Sendube tio devis esti la dio Num, aŭ ia spirito gardanta la princon (li vivu eterne kaj havu ĉiam apeton!).

—Eble efektive tio estas spirito— pensis Ramzes.

En Egipto ĉiam la pluvo estis pli malofta, ol bonaj aŭ malbonaj spiritoj.

La akvo de Nilo, antaŭe ruĝa, farigis bruna, kaj en aŭgusto, en la monato de Hator, ĝi atingis la duonon de sia alteco. En la apudbordaj akvobaroj oni malfermis la kluzojn, kaj la akvo komencis rapide plenigi la kanalojn kaj la grandegan artan lagon, Moiris, en la provinco Fajum, fama per siaj belaj rozoj. Malsupra Egipto prezentis kvazaŭ maran golfon, kies supraĵon superstiris montetoj kaj sur ili ĝardenoj kaj domoj. La kontinentaj vojoj malaperis, kaj la ŝipetoj tiel amase rapidis sur la akvo: blankaj, flavaj, ruĝaj kaj malhelaj, ke ili similis foliojn en aŭtuno. Sur la plej altaj punktoj de la lando oni finis la rikolton de iu speco de kotono, duan fojon oni falĉis la trifolion kaj komencis deŝiri la fruktojn de l' tamarindaj kaj olivaj arboj.

Foje, veturante preter la subakvigataj bienoj, la princo rimarkis neordinaran movadon. Sur unu el la artaj insuloj, inter arboj sonis terura krio de virino.

—Kredeble iu mortis— pensis la princo.

De alia insulo sur ŝipetoj oni transportis provizojn de greno kaj kelke da brutoj, kaj la homoj starantaj apud la konstruaĵoj de la bieno minacis kaj malbenis la homojn en la ŝipetoj.

En kelkaj pli malproksimaj bienoj estis trankvile, kaj la loĝantoj anstataŭ labori aŭ kanti, sidis silente sur la tero.

—Ili kredeble jam finis la laboron kaj ripozas.

Kontraŭe, de alia insuleto forbordigis ŝipeto kun kelke da plorantaj infanoj, kaj virino, enirante en la akvon ĝis la zono, minacis per la pugnoj.

—Oni kondukas la infanojn en la lernejon— pensis Ramzes.

Sed ĉi tiuj okazoj komencis interesi lin.

Sur la najbara insulo ree eksonis krio. La princo ŝirmis la okulojn kaj ekvidis kuŝantan sur tero homon, kiu nun batis per bastono.

—Kio farigis ĉi tie?...— demandis, Ramzes la remiston.

—Ĉu vi ne vidas sinjoro, ke oni batas mizeran kamparano?...— respondis la remisto ridante.— Sendube li pekas, la doloro do promenas sur liaj ostoj.

—Kaj vi, kiu vi estas?

—Mi?...— respondis la remisto kun fiero.— Mi estas libera fiŝisto Kaj se nur mi donas al lia sankteco lian parton de la akro, mi povas veturi sur la tuta Nilo, de la unua katarakto ĝis la maro. La fiŝisto estas kiel la fiŝo aŭ sovaĝa ansero, kaj la kamparano kiel la arbo: li nutras la sinjorojn per siaj fruktoj kaj povas nenien forkuri, li nur krakas, kiam la gardistoj lin senŝeligas.

—Oh!, oh!... rigardu tien...— ekkriis ree la fiŝisto kontenta, - Patro, patro!... Ne eltrinku la tutan akvon, estos malbona rikolto.

Ĉi tiu gaja ekcrio koncernis grupon da personoj, kiuj plenumis tre originalan taskon. Kelke da nudaj homoj tenis je la piedoj alian homon kaj subakvigis lian kapon ĝis la kolo, ĝis la brusto, fine ĝis la zono. Flanke staris sinjoro kun bastono, li havis makulitan tunikon kaj perukon el ŝafa felo.

Ne malproksime kriis freneze virino, kiun oni tenis je la mano.

La bastonado estis tiel populara en la feliĉa regno de l' faronoj, kiel la maĝado kaj dormado. Oni batas la infanojn kaj plenaĝulojn, kamparanojn, metiistojn, soldatojn, oficeirojn kaj oficistojn. Kiu vivis, ricevis bastonadon, ekster la pastroj kaj plej altrangaj oficistoj, ĉar estis plu neniu por bati ilin. La princo do sufiĉe indiferente rigardis la batatan kamparanojn, sed atentigis ĵin la kamparano subakvigata.

—Ha, ha!...— ridis la remisto,— kiel oni donas al li trinki!... Li tiel dikiĝos, ke lia edzino estos devigita plilargiĝi lian zonan.

La princo ordonis alibordigi. Dume oni eltiris la kamparano el la akvo, permesis al li eligi la akvon per la tusado kaj ree kaptis lin je la piedoj malgraŭ la neniamaj krioj de lia edzino, kiu komencis mordi la homojn, ŝin tenantajn.

—Haltu!— ekkriis la princo al la ekzekutistoj, kiuj tenis la malfeliĉulon.

—Faru vian devon!— kriis per nazvoĉo la homo en la ŝafa peruko.— Kiu vi estas, tro brava, kiu kurag!...

En ĉi tiu momento la princo ekbatis lin je la kapo per sia mezurilo, kiu feliĉe estis malpeza. Malgraŭ tio, la posedanto de la makulita tuniko tuj sidigis sur la tero, kaj palpinde la perukon kaj kapon, ekrigardis la atakanton per nebrilaj okuloj.

—Mi divenas— diris li per natura voĉo,— ke mi havas la honoron paroli kun ekminanta persono... Bona humoro

ĉiam, sinjoro, akompanu vin, kaj la galo neniam disfluu en viaj ostoj!...

—Kion vi faras kun ĉi tiu homo?— interrompis la princo.

—Vi demandas min, sinjoro— respondis la homo ree per nazvoĉo, - kiel eksterlandulo, kiu ne konas la morojn de la lando, nek la homojn, al kiuj li sin turnas tro intime. Sciŭ do, ke mi estas kolektisto de lia ekscelenco Dagon, la unua bankiero en Memfis, kaj se vi ankoraŭ ne paligis, ekseku, ke Dagon estas lunto, rajtigito kaj amiko de l' kronprinco (Vi vivu eterne!) kaj ke vi sur la teroj de l' kronprinco faris superforton, pri kiu atestos miaj homoj!...

—Do tio...— interrompis lin la kronprinco, sed subite haltis.— Je kia rajto vi tiel martiras la princan kamparanojn?

—Ĉar la fripono ne volas pagi la impostojn, kaj la trezorejo de la kronprinco bezonas monon...

La helpantoj de la oficisto, vidante la katastrofon de sia sinjoro, elalis la malfeliĉulon kaj staris ne sciantie kion fari, kiel la membroj de l' korpo senkapigita. La liberigita kamparano komencis kraĉi kaj elskui la akvon el la oreloj kaj lia edzino saltis al la savanto.

—Kiu ajn vi estas— ĝemis ŝi, kunmetante la manojn antaŭ la kronprinco,— dio aŭ eĉ sendito de l' faraono, aŭskultu pri nia mizero. Ni estas kamparanoj de la kronprinco (li vivu eterne!) kaj ni pagis ĉiujn impostojn: en milio, tritiko, floroj kaj brutaj feloj. Tamen en la lasta dekadeco venis al mi ĉi tiu jen homo kaj ordonas doni al si kvin mezurojn da tritiko... «Je kia rajto?»— demandas mia edzo— la impostoj ja estas jam pagitaj!» Kaj li ĵetas mian edzon teren, piedbatas lin kaj diras: «Je tia rajto, ke lia ekscelenco Dagon ordonas.» «Kie mi prenos?»— respondis mia edzo.— ni ne havas plu grenon kaj jam de unu monato ni nutras nin per la radikoj de lotuso, kaj pli kaj pli malfacile estas trovi ilin, ĉar la grandaj sinjoroj amas ludi per la floroj de— lotuso?...»

Ŝi perdis la spiron kaj komencis plori. La princo atendis pacience, ĝis ŝi trankviligis, sed la kamparano, kiun oni superforte dronigis, murmuris:

—Ĉi tiu virinaĵo per sia bablado aliros al ni malfeliĉon... kaj mi diras, ke mi ne amas, kiam la virinoj sin miuksas en la aferojn!

Dume la oficisto, proksimiĝinte al la remisto, demandis mallaŭte, montrante Ramzeson:

—Kiu estas ĉi tiu flavbekulo?

—Sekiĝu via lango!— respondis la remisto.— Ĉu vi ne vidas, ke li devas esti granda sinjoro: li bone pagas kaj forte batas.

—Mi tuj ekkonis— murmuretis la oficisto— ke tio devas esti iu granda. Mi pasigis mian ĵunecon en festenoj kun eminentaj sinjoroj.

—Jes. Kaj la saŭco de tiuj festenoj restas ankoraŭ sur viaj vestoj - murmuretis sub la nazo la remisto.

La virino satplorinte daŭrigis:

—Hodiaŭ venis ĉi tiu skribisto kun siaj homoj kaj diras al mia edzo: «Se vi ne havas tritikon, donu al ni du filojn, kaj la nobla Dagon ne nur ne postulos de ni la impostojn, sed eĉ pagos al vi por ĉiu infano du draĥmojn.

—Ve al mi!— kriis la savita kamparano.— Vi pereigos nin ĉiujn per via bablado... Ne aŭskultu ŝin, bona sinjoro!— li sin turnas al Ramzes.— Kiel la bovino imagas, ke ŝi forpelas la muŝojn per la vosto, same ĉi tiu virino pensas, ke ŝi fortimigos la kolektistojn per sia lango... kaj ili ambaŭ ne scias, ke ili estas malsaĝaj.

—Vi mem estas malsaĝa!— interrompis la virino.— Juna sinjoro, vi kiu havas reĝan aspekton.

—Mi vin prenas kiel atestantojn, ke ĉi tiu virino blasfemas...— diris duonoĉve la skribisto al siaj homoj.

—Odoranta floro, kies voĉo estas kiel la sono de l' fluto, aŭskultu min!...— pelegis la virino la princo. —Do mia edzo diris al ĉi tiu oficisto: «Mi preferus perdi du junajn bovojn, se mi posedus ilin, ol doni miajn knabojn, ĉe se oni pagus kvar draĥmojn jare por ĉiu. Ĉar se la infano forlasas la hejmon por servi aliloke, neniu vidos lin plu.»

—Sufokiĝu mi!... la fiŝoj manĝu mian korpon sur la fundo de Nilo!...— ĝemis la kamparano.— Vi ja, virino, detruos la tutan bienon per via plendo!...

La oficisto, vidante, ke li havas la subtenon de la persono plej multe interstata, elpaŝis antaŭen kaj komencis ree per nazvoĉo:

—De l' tempo, kiam la suno levigaĵas super la reĝa palaco kaj subiras post la piramidoj, plej eksterordinaraj okazoj estis vidataj en ĉi tiu lando. En la tempo de la faraono Semesepes apud la piramido Kohom oni rimarkis miraklajn fenomenojn kaj la plej falis sur Egipton. En la tempo de Boetos la tero malfermiĝis apud Babustis kaj englutis multe da homoj... Dum la regado de Nefterhes la akvoj de Nilo dek unu tagon estis doŭĵaj, kiel la mieleo. Tion oni vidis kaj plena aliajn aferojn, pri kiuj mi scias, ĉar mi estas plena de saĝo. Sed oni vidis neniam fremdulon, elirintan el akvo kaj malhelpantan kolekti impostojn en la bienoj de lia ekscelenco, la kronprinco.

—Silentu!— ekkris Ramzes— kaj iru for. Neniu forprenos viajn infanojn— aldonis li al la virino.

—Facile estas al mi iri for— respondis la kolektisto— ĉar mi havas rapidan ŝipeton kaj kvin remistojn. Sed donu al mi, via ekscelenco, ian signon por mia sinjoro Dagon.

—Demetu la perukon kaj montru al li la signon sur via kapo— diris la princo— Kaj diru al Dagon, ke mi faros al li similajn signojn sur la tuta korpo...

—Ĉu vi aŭdas la blasfemon?...— murmuretis la skribisto al siaj homoj, irante malantaŭen al la bordo, kun profundaj salutoj.

Li eniris en la ŝipeton, kaj kiam liaj helpantoj forpuŝis la ŝipeton kaj malproksimiĝis kelkdekon da paŝoj, li komencis krii etendante la manojn:

—La krampo premu viajn internaĵojn, ribeluloj, blasfemuloj!... Mi veturas rekte al la kronprinco kaj mi rakontos al li, kio fariĝas en liaj bienoj!...

Poste li prenis bastonon kaj komencis bati siajn homojn, pro tio ke ili ne defendis lin.

—La samo estis kun vi!— kredis li, minacante Ramzeson.

La princo saltis en sian ŝipeton kaj furioza, ordonis al la remisto persekuti la malhumilan oficiston de la procentegisto. Sed la skribisto en la ŝafa peruko jetis sian bastonon kaj komencis mem remi: liaj homoj tiel fervore helpis lin, ke ne eble estis kapti ilin.

—Pli facile strigo kaptos hirundon, ol mi ilin, mia bela sinjoro— diris ridante la remisto de Ramzes— Sed vi estas sendube ne termezuristo, sed oficisto. Vi tuj batas je la kapo! Mi konas tion bone: mi mem estis kvin jarojn en la armeo. Mi ĉiam batis je la kapo aŭ ventro kaj mi vivis ne plej malbone. Kaj se iu ekbatis min, mi tuj komprenis: ke li devas esti iu granda... En nia Egipto (neniam forlasi ĝin la dio) estas terure malvaste; domo apud domo, urbo apud urbo, homo apud homo.

Se oni volas pli malpli libere sin turni en la amaso, oni devas bati je la kapo.

—Ĉu vi estas edzigitaj?— demandis la princo.

—Hm! se mi havas virinon kaj lokon por unu kaj duono da persono, mi estas edzigitaj, sed en aliaj okazoj mi estas fratlo. Mi ja estis soldato kaj scias, ke la virino estas bona unu fojon tage, kaj ne ĉiam. Ŝi malhelpas.

—Eble vi akceptus servadon ĉe mi? Kiu scias, eble vi ne bedaŭrus tion?

—Kun la permeso de via ekscelenco, mi tuj rimarkis, ke vi povus komandi regimenton, malgraŭ via juna vizaĝo. Sed mi fariĝos nenies servisto. Mi estas libera fiŝisto; mia avo estis (mi petas vian pardonon) paŝtisto en Malsupra Egipto, nia gento devenas de Hiksos'oj. Estas vero, ke la malsaĝaj egiptoj kamparanoj molas nin, sed tio igas nin ridi. Kamparano kaj Hiksos, mi tion diras al via ekscelenco, estas kvazaŭ bovo kaj bovovirino. La kamparano povas iri post la plugilo kaj antaŭ la plugilo, sed Hiksos servos nenian sinjoron. Eble nur en la armeo de lia sankteco, ĉar tio estas armeo.

La bonhumora remisto parolis senĉese, sed la princo ne aŭskultis lin plu. En lia animo pli kaj pli laŭte sonis tre doloraj demandoj, tute novaj. Do ĉi tiuj insuletoj, preter kiuj li veturis, apartenas al liaj bienoj? Stranga afero: li tute ne scias, kie estas liaj bienoj kaj kian aspekton ili havas. Do en lia nomo Dagon ŝarĝis la



kamparanojn per novaj impostoj, kaj la stranga movado, kiun li rigardis preterpasante la bordojn, estis kolektado de l' impostoj?... La kamparano, kiun oni batis sur la bordo, sendube ne havis rimedojn por pagi. La infanoj, kiuj maldolĉe ploris en la ŝipeto, estis venditaj por tuta jaro po unu draĥmo ĉiu. Kaj la virino, kiu eniris en la akvon ĝis la zono kaj malbenis, estis ilia patrino.

—La virino estas tre maltrankvilaj— diris al si la princo.— Sara estas la strigo trankvila el la virino, sed aliaj amas multe babiloj, plori kaj krii!...

Li rememoris la kamparanojn, kiuj trankviligis la preterpasadon de sia edzino. Lin oni dronigadis, kaj li ne koleras, al ŝi oni faris nenion - tamen ŝi kriis kiel freneza.

—La virino estas tre maltrankvilaj!...— ripetis li.— Jes, ĉe mia respektinda patrino... Kia diferenco inter mia patro kaj patrino! Lia sankteco tute ne volas scii, ke mi forlasis la armeon por knabino, sed la reĝinon interesas ĉio, tio, ki mi prenis en mian domon Hebreinon... Sara estas la plej trankvila el la virinoj, kiujn mi konas, kontraŭe Tafet babilas, ploras kaj krias kiel kvar!...

Poste la princo rememoris la vortojn de la edzino de l' kamparano, ke jam de unu monato ili ne manĝas grenon, sed la grajnojn kaj radikojn de lotuso. Ĝiaj grajnoj estas kiel la papavo, la radikoj— ne tre bongustaj! Li ne manĝus tion eĉ tri tagojn intersekvajn. Cetere, la pastroj, kiuj okupiĝas per la kuracado, konsilas ŝanĝadi la

nutraĵon. Ankoraŭ en la lernejo oni diris al li, ke oni devas manĝi alterne viandon kaj fiŝojn, daktilojn kaj trilikon, fiĝojn kaj hordenon. Sed dum tuta monato sin nutri per la grajnoj de lotuso!... Nu, kaj la ĉevalo, bovino?... La devulo kaj bovino amas la fojnon, kaj la hordenaj buletoj oni devas superforpe ŝuti en ilian gorĝon. Versajne ankaŭ la kamparanoj preferas sin nutri per la lotusaj grajnoj, kaj manĝas sen apetito la platajn kukojn triitajn kaj hordenajn, fiŝojn kaj viandon. Cetere, la plej piaj pastroj, miraklofarantoj, tŭas neniam viandon aŭ fiŝojn. Kredible la riĉuloj kaj reĝaj fiĝoj bezonas viandon, kiel la leonoj kaj agloj, kaj la kamparanoj - herbon, kiel la bovo.

Sole... ĉi tiu dronigado por la impostoj. Sed ĉu sin banante kun la kolegoj li ne subakvigis ilin, kaj ĉu mem ne subakvigis?... Kiaj ridoj estis tiam. La subakvigado, ludo, koncerne la bastonadon, kiom da fojoj oni batis lin en la lernejo?... Tio doloras, sed, ŝajnas, ne ĉiun estaĵojn. Bata hundo bojas kaj mordas; bata bovo eĉ ne turnas sin. Same la bastonado estas doloro por granda sinjoro, sed kamparano krias nur, por sakriĉi la bona okazo. Eĉ ne ĉiuj krias, la soldatoj kaj oficiraj kantas sub la bastonadon.

Ĉi tiuj saĝaj konsideroj ne povis tamen sukfi malgrandan, sed turmentantan maltrankvilon en la koro de l' kronprinco: lia tuanto Dagon ŝarĝis liajn kamparanojn per maljusta imposto, kiun ili ne povis pagi!

En ĉi tiu momento okupis lin ne la kamparanoj, sed la patrino. Lia patrino sendube estas informita pri la marmstrudado de la Fenicianoj. Kion ŝi diros pri tio al la filo? Kiel ŝi rigardos lin? Kiel sarkasme ŝi ridetos!... Kaj ŝi ne estus virino, se ŝi ne dirus al li:

—Mi ja diris al vi, Ramzes, ke la Fenicianoj ruinigos viajn bienojn.

—Se la perfidaj pastroj— pensis la kronprinco— oferus al mi hodiaŭ dudek talentojn, morgaŭ mi forpelus Dagonon, miaj kamparanoj ne ricevus bastonadon kaj ne estus dronigataj, kaj mia patrino ne ridus min... La dekonon, la centono da riĉuloj, kiuj kuŝas en niaj temploj kaj en kiuj sin paŝtas la avidaj okuloj de la razitaj kapoj, por longaj jaroj faris min homo sendependa de Fenicianoj!...

En ĉi tiu momento stranga ideo trapasis kiel fulmo la animon de Ramzes, ke inter la kamparanoj kaj pastroj ekzistas ia profunda antagonismo.

—Pro la kulpo de Herhor— pensis li— sin pendigis la kamparano sur la limo de l' dezerto... Por liveri ĉion necesan al la pastroj kaj temploj malficale laboras du milionoj da Egiptanoj!... Se la riĉuloj de l' pastroj apartenas al la faraono, mi ne bezonus pruntepreni dekkvin talentojn kaj miaj kamparanoj ne estus tiel terure premegetaj!... Jen kie estas la fonto de la malficiteco de Egipto kaj de la malforteco de ĝiaj reĝoj!...

La kronprinco komprenis, ke oni agas maljuste kontraŭ la kamparanoj, malgrandiĝis do lia doloro, kiam li malkovris, ke la kaŭzo de la malbono estas la pastroj. Li tute ne konsideris, ke lia juĝo povas esti erara kaj maljusta.

Cetere li ne juĝis, sed indignis. Sed la kolero de l' homo neniam sin turnas kontraŭ lin mem; tiel, malsata patrino ne manĝas la propran korpon, sed svingante la voston kaj alpremente la orelojn serĉas ĉirkaŭ si la atakoton.

Kajeroj

el la Sudo



**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ
ESPERANTISTAJ (HALE)**

**REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, Tfn° (00 34) 658
E30080 MURCIA, 166 323
HISPANIO**

**Retskribu al
jesuo@ono.com**

<http://213.172.47.3/gazetoteko/kajeroj/k63.htm>

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k63.htm>

**La 4^a Kongreso de HALE estos
Kongreso Virtuala**

**De la 1-a ĝis la 15-a de decembro
vi partoprenu la 4-an kongreson
de HALE de ĉiu ajn loko de la
mondo!**

**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.
ISSN 1697-6460**